

Agadoj rilate al mediprotektado en Kubo



Resume pri la agadoj de Kubo rilate al mediprotektado, indas rememori ke en la kariba insulo ekzistas integrala politiko ĝata celanta apliki nacian strategion por alfronti la klimatan ĝanĝon. Tiu ĝi programo estas konata kiel Tasko Vivo.

La ministrino pri scienco, teknologio kaj medio, Elba Rosa Pérez Montoya, klarigis dum la ordinara sesio de la nacia parlamento, la studojn pri media risiko kiuj estis faritaj ĝis la nuna momento kaj la aktualigon de la esploroj en ĝiu teritorio.

Ĝi konfirmis ke estis pristuditaj aferoj rilataj al la mara enpenetro, la marborda protekto, la maraltiĝo kaj solvoj tiucelaj, interalie. Dum la jaro 2018 oni faris diversajn kontroltaskojn pri la temo en 12 el la 15 kubaj provincoj.

La ministrino aldonis ke ĝis nun, oni finis 109 studojn pri danĝero, vundebleco kaj risiko, kaj oni efektivas aliajn 46 studojn, el il 22 pristudas la danĝerojn naturajn, 11 el teknologia origino kaj aliaj 13 sanitaraj. Same, estis aprobita alia studo pri danĝero, vundebleco kaj risiko pro sekeco en la orienta provinco Santiago de Kubo.

En la lando oni ellaboris la mapon de atentigo pri la altiĝo de la averaĝa marnivelo pro la klimata ĝanĝo. Oni kalkulas ke la maraltiĝo kreskis dum la lastaj jaroj. Okdekvin elcento de la sablaj plaĝoj de Kubo prezentas spurojn de eroziado: 23 kun intensa eroziado kaj 195 kun meza

erosiado.

La kuba fakulino precizigis ke la? kolektitaj pruvoj, por la jaro 2050 la insulo perdos pli ol 2 691 kvadratajn kilometrojn da tero, tio estas, 2,3% de la nacia teritorio. Por 2100, oni kalkulas perdon super 6 371 kvadratajn kilometrojn, tio estas, 5,5% de la nacia teritorio. ?i ratifis ke ekzistas 574 lo?lokoj homaj kaj 263 akvofontoj vundeblaj pro enmiksi?o de mara salo.

Dum la jaro 2018 Kubo plu evoluigis la instaladon de eolaj parkoj, sunpaneloj kaj minihidroelektrejoj, kun la celo pliigi la produktadon de pura energio.

Por plenumi tiajn celojn la insulo devas kreskigi la ?eeston de renovigeblaj energifontoj en la elektra generado ?is 24%. La biomaso reprezentas 14%. La eola energio konsistigos 6% de la energetika matrico, kaj plu evoluos en tiu sama ordo la fotovolta sunenergio kaj la hidroenergio.

?io ?i ebligis al Kubo anstata?igi 1,75 milionojn da tunoj de fosiliaj kruda?oj jare kaj ?esi emision al la atmosfero je 6 milionoj da tunoj de dioksida karbono.

<https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/ciencias/179325-agadoj-rilate-al-mediprotektado-en-kubo>



Radio Habana Cuba